
# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo majo 2025**


## KOMENCIĜAS LA HISPANA KONGRESO EN SORIO

Je la 1-a de majo komenciĝas la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu okazas en Sorio en la feriponto de la festo de la laboro.




El ĉ. 150 aliĝintoj, sesono venas el la madrida regiono. Madridanoj ankaŭ ĉefrolas en la organizado kaj en diversaj partoj de la programo.

Trideko da programoj kaj laborsesioj konsistigas kernon de la programo. Oni ankaŭ antaŭvidas muzikajn koncertojn, prezentojn de libroj, laborsesiojn, ludojn, ktp. Ampleksa turisma programo gvidos vizitantojn tra la stratoj de Sorio kaj ankaŭ al la proksimaj Numantio kaj El Burgo de Osma. Poezia vespero omaĝos la sorian poetinon (loĝantan en Madrido) María Ángeles Maeso.

Pluraj el la aktivadoj estas malfermaj al la publiko de la gastiganta urbo.

La tuta ampleksa kaj diversa programo estas trovebla ĉe: https://kongreso.esperanto.es/la-programo/.

Pliajn informojn interesatoj povas trovi en la adreso: https://kongreso.esperanto.es/, kun la aliĝilo kaj la listo de aliĝintoj. Krome, oni malfermis Telegramkanalon: https://t.me/HispanaEsperantoKongreso, por uzo de la kongresanoj.

## AGADOJ OKAZE DE LA SEMAJNO DE LA LIBRO



Kiel anoncite en pasinta eldono, la madrida grupo aŭ individuaj esperantistoj partoprenis agadojn okaze de la Tago de la Libro.

Du junuloj, Irene kaj Adam, partoprenis en la sinsekva legado de Don Quijote en la kulturcentro Círculo de Bellas Artes, la 23-an de aprilo. Ĉijare la legado estis pli longa ol kutime, kaj ili legis la tutan 7an ĉapitron de la verko.

Madrida Esperanto-Liceo ankaŭ partoprenis en "La Nokto de la libroj", organizita de la madrida regiono la 25-an de aprilo, per la prezentado, fare de ĝia aŭtoro, Ana Manero, de verko pri la pentristino Maruja Mallo, apartenanta al elstara periodo de la hispana kulturo en la 20a kaj 30a jardekoj de la 20a jarcento. La libro, kun titolo: "Maruja Mallo: Mucho más que una artista de vanguardia", kaj eldonita de SATeH (SAT en Hispanio), estas dulingva, hispana kaj esperanta, kaj estas jam aĉetebla en la sidejo.



En Fuenlabrado la loka esperantista asocio FEL estis invitita partopreni la 25-an en aktivado de disvastigo de la libroj en loka lernejo. Oni muntis budon kun libroj en Esperanto kaj respondis la demandojn de vizitantoj.




La 26-an de aprilo oni organizis omaĝon al María Ángeles Maeso en la kvartalo Usera. Mati Montero legis poemon en Esperanto, el la antologio “Ni iras, vidas”, kaj anoncis la omaĝon kiun oni faros al ŝi dum la Esperanto-kongreso.

## MADRIDAJ RENKONTOJ

La libroprezentado anoncita por la 28-a de aprilo fine ne povis okazi por la perturboj en la elektra reto kiuj okazis en al tuta Hispanio tiun tagon. La prezento estas prokrastita ĝis la mardo, 6-a de majo, je la sama horo 18:45. Temas pri romano de la itala esperantisto kaj arabisto, Viviana, “Serendipeco”, eldonita dulingve itale kaj esperante, sub pseŭdonimo Stasia Chylicki, kiu rilatas sperton, ne foran de la vivo de la aŭtoro, pri familia malkovro kaj renkonto, en kiu la internacia lingvo iele rolis.

La unuasabata kunveno okazos la 10-an de majo, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera kaj sen programo.

Memoru ankaŭ ke la sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentadojn kaj aliajn aktivadojn.

## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero vi povas trovi nin ĉe: https://x.com/LiceoMadrida. Kaj memoru ke MEL malfermis profilon ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com